



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 245

Septembro, 2006

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆

## POST LA FINA VENKO, KIO?

### Kelkaj pensoj pri Esperantismo kaj multlingvismo

Kial, diable, homoj tiom rezistas al Esperanto? Laŭ mi, unu el la ĉefaj kaŭzoj estas, ke ili timas, eĉ timegas, ĉu konscie aŭ nekonscie, ke tiu internacia lingvo, se ĝi estus ĉie enkondukata, grave endanĝerigus iliajn proprajn lingvojn. Jen mia tezo: tio estas danĝero ne imagata, sed reala, kaj mankas al ni Esperantistoj bone pripensita respondo al tiuj tute pravaj timoj. Sen tia respondo, neniam ni konvinkos la mondon pri la bono de Esperanto. Laŭ kelkaj, Esperanto neprobable iam ajn finvenkos. Tamen la ideo, ke Esperanto iam fariĝu ĉie agnoskata monda lingvo, estas gravega parto de Esperantismo. Kiel konvinki homojn pri la pravo de tiu ideo? Kiel kvietigi iliajn timojn? Tio ne estas nura akademia demando, sed gravegas por nia nunnuna agado! Se ni serioze celas la finvenkon de Esperanto, ni devas proponi al la mondo multe pli ol Esperanto: ni devas proponi al ĝi zorge pripensitan planon por monda multlingvismo, de kiu Esperanto mem konsistigos nur parton. Se ni ne faros tion, kaj se kontraŭ ĉiu neproblablo Esperanto tamen finvenkos, ni riskos teruran koŝmaron: la realiĝon de nia revo! En mondiĝanta situacio kiel la nuna, tiu ja bela idealo, ke Esperanto fariĝu dua lingvo por ĉiuj en la monda familio, povus konduki al terura katastrofo por naciaj lingvoj kaj kulturoj. Ja nepras klara plano celanta nuligi tiun riskon.

Sed kiel Esperanto povus endanĝerigi naciajn lingvojn? Niaj celoj kaj intencoj estas ja tute bonaj. Ni ja klare kaj ripete defendas lingvan demokration kaj lingvan justecon. Sed... imagu, ke iam internaciaj institucioj, mondaj sciencaj revuoj, ktp, apogataj de grandaj potencoj, elektas Esperanton kiel ĉefan lingvon por internaciaj rilatoj. De tiu momento, laŭ mi, estiĝos gravega danĝero, ke Esperanto fariĝos eĉ pli invadema ol la angla estas nun! Kial?

Unue ĉar Esperanto de tiam ne plu estos regata de ni bonintenculoj, animataj de la "interna ideo" de Zamenhof, sed de mondaj potencoj, kiuj agas nur por sia propra intereso (kvankam bonintenculoj ofte estas eĉ pli timendaj ol malbonintenculoj...). Ekzemple, por monda diktatora reĝimo, Esperanto estus efikega ilo por forigi ĉiujn kulturajn apartecojn inter homoj. Due, Esperanto allogos pro sia neŭtraleco, t. e. pro la fakto, ke ĝi ne estas, kiel la nun internacie reganta angla, la nacia lingvo de nur kelkaj landoj de la mondo. Trie, Esperanto altiros per tio, ke ĝi estas multe pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. Antaŭvideblas, ke pli da homoj studos ĝin ol la anglan, kaj pli efike ĝin lernos. En la nuna mondo internaciaj realaĵoj multmaniere trudas sin, pli kaj pli, en la vivon de la popoloj. La efiko foje bonas, foje malbonas. Se Esperanto estus la reganta internacia lingvo, ĝi multloke ja trudus sin en la vivon de homoj - certe ne ĉiam bonefike. Esperanto ja povus fariĝi tiom aŭ eĉ pli inside alloga ol la angla! Ĉu eviteblas tiu danĝero? Eble jes. Sed tio postulos longan, fundan pripensadon, longan, fundan debaton, kiun ni Esperantistoj apenaŭ komencis.

Atentu, ke la angla hodiaŭ tiom disvastiĝas ne nur pro rekta aŭ malrekta altrudado fare de Usono aŭ aliaj anglalingvaj landoj, sed ankaŭ simple ĉar, por komuniki internacie, ofte pli simplas uzi internacie disvastigitan lingvon. Kial estus malsame kun Esperanto?

Jen konkretaj ekzemploj de antaŭvideblaj danĝeroj. En komerco kaj industrio: Mondskale multiĝas firmaoj, kiuj internacie funkcias aŭ agas. En tiuj, dungitoj devas pli kaj pli uzi la anglan en sia ĉiutaga laboro, anstataŭ sia propra nacia lingvo. La anstataŭigo de la angla per nia Esperanto verŝajne ne ŝanĝus tion. En scienco: Jam nun, en fakaj publikaĵoj pri matematiko, fiziko, kemio, biologio, oni preskaŭ ne plu uzas aliajn lingvojn ol la anglan. Facile povus esti same kun Esperanto. En universitatoj: Jam nun, en multaj skandinavaj universitatoj, multaj kursoj estas instruataj en la angla. Unu konsekvenco estas, ke por kelkaj tieaj studentoj eĉ fariĝas malfacile uzi sian denaskan lingvon por paroli aŭ skribi pri fakaj temoj! Se Esperanto fariĝus la nova monda lingvo, eble eĉ pli da universitataj kursoj en la mondo estus tiam instruataj en Esperanto, kun la samaj bedaŭrindaj sekvoj. En familioj: Antaŭvideble estos pli kaj pli da internaciaj familioj. Pli kaj pli da ili loĝos, laboros, studos sinsekve en diversaj landoj. Se Esperanto estus la efektiva internacia lingvo de la mondo, pli kaj pli da tiuj familioj elektus ĝin kiel ĉefan familian lingvon. Eble iam, post kelkaj jarcentoj, se la homaro tiom longe supervivos, tiaj familioj fariĝus eĉ la plejmultaj en la mondo! Nu, tiuj estas nur kelkaj ekzemploj el multaj. Se la internacia lingvo pli kaj pli invados firmaojn, sciencojn, universitatojn, eĉ familiojn, tiam, post sufiĉe longa evoluado tia, kiuj kampoj restos al naciaj lingvoj? Ĉu ili fine fariĝos nuraj hobiaj de malmultaj disaj stranguloj? Ĉu miaj prapranepoj plu uzos la francan nur en kelkaj tradiciaj kantoj kaj por supraĵaj konversacioj pri la vetero?

Tie kuŝas realega danĝero. Fakte tiel evoluadis la franca en regionoj de Kanado kaj Usono, kie franclingvanoj konsistigas malplimulton. Same la okcitana en suda

Francujo rilate la hegemonian francan. Kaj same en multegaj landoj. Franclingvanoj de Kanado kaj Usono bonege scias, kiom malfacilegas kontraŭstari la atrakcian forton kaj simplan praktikan utilon de la lingvo uzata en la pli vasta medio ĉirkaŭanta ilin. KREDU MIN, tio estas verega problemo. Ĉu la registaroj de la mondo vere kaj efike klopodus eviti tiujn danĝerojn? Se la nunaj registaroj plejmulte ege malrigoras rilate la ja hegemonian anglan aŭ aliajn hegemoniajn lingvojn, kiom pli ili malrigoros rilate la nur potenciale hegemonian Esperanton! Kion fari? Ĉu, post la fina venko de Esperanto, ĝiaj pacaj batalantoj estos devigataj returniĝi kaj ekbatali kontraŭ la novhegemonian Esperanton?

Ni ne estu tro pesimismaj, tamen. Kio klaras, estas ke Esperanto, per si mem, neniel solvas la mondan lingvan problemon. Aŭ almenaŭ ne nepre juste solvas tiun problemon. La uzado de Esperanto kiel internacia lingvo ĉie en la mondo estas pensebla nur kune kun la aplikado de sistema, vigla, zorga politiko favore al multlingvismo kaj interlingva komunikado, ĉie en la mondo. Povas inspiri nin la ideoj de la svisa ekonomikisto François Grin pri ebla rolo de Esperanto en multlingva Eŭropa Unio (vidu <[cisad.adc.education.fr/hcee/publications-2005.html](http://cisad.adc.education.fr/hcee/publications-2005.html)>).

Tiurilate substrekendas, ke tia multlingvisma politiko devus celi ne nur la *konservadon* de naciaj lingvoj kaj kulturoj. Ĉi tiuj havas ankaŭ gravan praktikan valoron, eĉ en internaciaj rilatoj: en ĉi tiuj, la koncernaj naciaj lingvoj nemalofte montriĝas multe pli bonaj komunikiloj ol iu ajn internacia lingvo! Tiukampe nenio simplas. Bedaŭrinde, ni Esperantistoj ofte tro naivas rilate multlingvismon. Mi estas loĝanto de Montrealo, la plej granda kaj multlingva urbo de Kebekio (provinco en Kanado) kaj tial akute konscias pri la grandaj problemoj ligitaj al multlingvismo (ĉe ni, temas precipe pri la franca kaj angla). Ne ekzistas simplaj solvoj. Ekzemple, bezonatas, interalie, leĝoj por iom kontroli la uzadon de lingvoj en institucioj kaj diversaj cirkonstancoj. Sed redakti tiajn leĝojn malfacilas. Apliki ilin malfacilas. La lokaj diverslingvaj loĝantaroj facile emociiĝas pri la temo. Problemoj senfinaj!

Malfacilega, malripoziga temo, ĉu ne? Nu, ni prenu la tempon bone pripensi, prilabori, pesi tiun ideon, ke Esperanto fariĝu dua lingvo por ĉiuj en la mondo. Kiu scias? Eble, post tio, ni decidus tute forlasi tiun forlogon, ve! tro belan ideon kaj simple uzi Esperanton kiel malgrandskalan ilon por internaciaj rilatoj - laŭ la ideoj de la fama Raŭma manifesto. Eĉ tiel, Esperanto restus valorega posedaĵo de la homaro.

— Francisko LORRAIN (Montrealo, Kanado)  
francisko.lorrain@mac.com

Komentoj, opinioj, kritikoj bonvenas.

## Eŭropa Tago de Lingvoj

Marde, la 26-an de septembro, la landoj de la Eŭropa Unio jam la 6-an fojon solenas la Eŭropan Tagon de Lingvoj, kies celo estas lanĉi konojn pri la lingva varieco de la kontinento kaj instigi al la lernado de fremdaj lingvoj. En la Eŭropa Unio 20 lingvoj havas la statuson de la oficiala lingvo. Ekde la 2007-a jaro aldoniĝos la irlanda. Laŭ raporto de la Eŭropa Komisiono por la Kulturo kaj Edukado, ĉirkaŭ la duono de eŭropanoj kapablas interkompreniĝi en lingvo alia ol la gepatra. Plej ofte temas pri la angla, germana kaj franca. En la tuta Eŭropo estas uzataj 225 lingvoj, sed 77 estas minacataj per malapero, inter ili la vaska, kimra, bretona kaj kaŝuba.

— elsendis Radio Polonia en Esperanto la 26-an de septembro, 2006

Redaktoro de *Inter Ni*

Estimata Redaktora Moŝto,

Estas aŭtuno, sezono kiam la musoj ŝatas eniri mian domon. Ĉiujare mi devas aktivigi kelkajn risortajn musmortigilojn (kiuj ankaŭ nomiĝas „muskaptiloj“), kaj ĉiujare mi havas la saman problemon. Mi turnas min al vi aŭ viaj legantoj por konsilo.

Mi povas sufiĉe facile tiri la dikan svingdraton kontraŭ la forta risorto. Mi ankaŭ povas teni ĝin per la stangeto kiun mi kroĉas sub la ellasilo. Bone. Sed kiam mi nun metas la fromaĝon sur la ellasilon, ofte mi movetas la ellasilon nur iomete sed sufiĉe, ke tiu terura musmortiga svingdrato subite frapas miajn fingrojn. Estas tre doloriga! Ĉu iu povus helpi min?

Sincere la via,  
Kon Fu Zita

Estimata S-ro Zita,

Multan dankon pro via tre sentebla demando. Laŭ mia opinio, vi devus uzi muskaptilon anstataŭ musmortigilon. Kial vi ne uzu etan kaĝon por kapti ĉiun muson, kaj portu ĝin en la arbaron, kie vi liberigu ĝin por elvivi la normalan vivon de eta ronĝulo?

Samideane salutas  
via redaktoro

